

Pola Esperanto-Asocio
filio Gliwice

Kroniko



Jaro 2010



La 30-an de januaro 2010 (sabato) je **la 11-a horo** okazos novjara renkontiĝo en la sama loko kiel pasintjare: *Centrum Organizacji Pozarządowych Gliwice, str. Zwycięstwa 1*. Ni kore invitas Ĉiujn!

Novjara Renkontiĝo en Bielsko-Biała

La 17-an de januaro 2010 en Bielsko-Biała okazis Novjara Renkontiĝo kun E-Sankta Meso kaj oblato. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 50 esperantistoj el suda parto de Pollando kaj du ĉeĥoj. Estis tie ankaŭ kelkaj glivice'anoj. Kunvenon komencis spektaklo de moderna versio de konata fabelo "Ruĝa Kapuĉeto". Spektaklon prezentis infana ensemblo el Kulturdomo. Junaj artistinoj estis tre bone preparitaj kaj montris grandan talenton. Sekve junaj dancistinoj en belaj vestaĵoj prezentis kelkajn modernajn dancojn. Prezentoj de junulinoj tre plaĉis al ĉiuj. Poste Bożena Gierula salutis partoprenatojn en la nomo de organizantoj. Salutvortojn diris ankaŭ Stanisław Mandrak en la nomo de glivice'anoj kaj Jerzy Walaszek el Sosnowiec interese parolis pri ĉirkaŭaj sanktaj lokoj Górka kaj Palenica. Fine ĉiuj interdividis per oblatoj, diris bondezirojn, kantis kristnaskajn kantojn, trinkis kafon, teon, sukron kaj manĝis kukojn. Dum la renkontiĝo regis tre afabla etoso. Ni gratulas al organizantoj kaj dankas pro tre bonega kunveno.





En revuo "Esperanto" (Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio)
n-ro 1233 (2) * Februaro 2010
aperis artikolo pri nia jubilea renkontiĝo **GRUPE - 13**

100-jariĝo en Gliwice

Pli ol 100 jarojn funkcias Esperanto en la pola urbo Gliwice. Jam en 1905 en la tiama germana urbo Gleiwitz vivis unuopaj esperantistoj. En majo 1909 komencis sian funkciadon ĝia loka Esperanto-grupo.

Gleiwitzaj esperantistoj partoprenis jam tiam en diversaj renkontiĝoj, interparolis persone kun ges-roj Zamenhof, partoprenis en la 8-a UK en Krakovo kaj agadis en diversaj grupoj. Multajn faktojn pri tio oni povas trovi en germanaj Esperantaj muzeoj. Por rememori tiun jubileon la Glivicea filio de PEA en novembro 2009 okazigis sian tradician renkontiĝon GRUPE-13. Venis kvardeko da esperantistoj el kelkaj polaj urboj kaj gastoj el la partnera urbo Dessau en Germanio. La gastoj transdonis salutleteron de la urbestro de Dessau al la urbestro de Gliwice. La urban estraron reprezentis la sekretario de la urba estraro Andrzej Karasiński kaj la prizorganto de la muzeo de la radiostacio en Gliwice Andrzej Jarczewski. Vendrede la 6-an de novembro estis malfermita porokaza ekspozicio, en kiu oni montris materialojn ligitajn kun la Emovado dum la pasintaj cent jaroj. Samtage ankaŭ la gasto el

Germanio Gerhard Hirschmann prelegis pri kunlaboro Inter Eŭropo kaj Afriko. Sabate, krom informoj pri nia movado, la partoprenantoj aŭskultis interesan prelegon de Roman

Dobrzyński pri la historio de la pola himno. Sabate vespere oni spektis la monodramon Ludoviko Lazaro, prezentatan de Georgo Handzlik. La partoprenantoj povis spekti du interesajn filmojn de Roman Dobrzyński pri la IJK en Zakopane kaj pri partnereco de la urboj Gora (PL) kaj Herzberg (DE). Dimanĉe oni povis, laŭ invito de la Muzeo-Radiostacio en Gliwice, aŭskulti interesajn rakontojn pri mitoj kaj faktoj, ligitaj kun la fama hitlera provoko en septembro 1939, okazinta en la radiostacio. Oni devas mencii, ke s-ro Jarczewski jam en marto 2009 eldonis libron pri tiu temo, titolitan Provokado, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Esperanto en la urbo Gliwice. Multaj el la partoprenantoj promesis veni ankaŭ venontjare por festi la eniron en la duan jarcenton de la Esperanta agado en Gliwice.

Stanisław Mandrak



Novjara Renkontiĝo en Gliwice



La 30-an de januaro 2010 okazis nia tradicia novjara esperantista renkontiĝo. En ĝi partoprenis 20 geesperantistoj el Gliwice kaj el najbaraj urboj. La kunvenon komencis Stanisław Mandrak salutante partoprenantojn kaj dezirante ĉion bonan en Nova Jaro. Poste ĉiuj interdividis per oblatoj, diris bondezirojn, rigardis multmediajn prezentadojn pri kristnaskaj tradicioj kaj kantis esperante kristnaskajn kantojn. Malgraŭ malvarma tago, dum nia renkontiĝo estis tre varma kaj afabla etoso. Ni organizantoj tre dankas al ĉiuj pro alveno kaj invitas venontjare.





Esperanto – Sumoo



Samideano **HORI Jasuo** el Japanio invitas al Esperanto-Sumoo:
 "Sumoo estas japana tradicia lukto. Ĉiun jaron okazas 6 turneoj.
 Unu turneo daŭros 15 tagojn.
 En marto, ekde la 14a ĝis la 28a, okazos Printempa Sumoo-turneo.
 Okaze de tiu turneo mi proponas al vi partoprenon en **Esperanto-Sumoo**."

Tago de Virinoj



Kobieta / Virino

Ty byłaś w wierszach, w pieśniach...w rymach swych poeta
Nazywał Cię istotą wietrzną, słabą, puchem marnym...
To już przebrzmiało dziś... Dziś każdy wie - kobieta
To trud, to walka, ból, to-wielki czyn ofiarny.



Miałaś postacie różne w domowym ognisku
Byłaś kapłanką cichą, pracującą skrycie
I tylko pieśń, którą śpiewałaś nad kołyską
Szła później za nim w świat, przez trudne, znojne życie.

Ty byłaś tą od której wszystko się zaczyna
I która wszędzie jest, choć na uboczu stanie...
Na krwawy bój żegnałaś ostatniego syna
Bez jednaj łzy, bez skargi, bez szemrania.



A potem sztandar walki wzięłaś sama
To już nie cicha słodycz, to nie rymy wiersza
I kiedy żołnierz konając wołał "mama"
Ty szłaś w szeregach też zwycięska, silna pierwsza.

Ty jesteś coraz inna, bo masz sto postaci
Byłaś gdzie miłość, gdzie ofiara, trud lub klęska
A dziś pracownica szara w biurze, przy warsztacie
Ty jesteś pierwsza znów i jesteś znów zwycięska.



Nam nie potrzeba już banalnych komplementów
I hołdów, które w darze składa nam poeta
To już przebrzmiała pieśń - bo każdy dziś pamięta,
Że czyn ofiarny, trud i walka - to KOBIEȚA.

Anna Rudawcowa

Kurso de Esperanto

La 8-an de marto 2010 komenciĝis kurso de Esperanto por komencantoj. En la kurso partoprenas studentoj de la Universitato de Tria Aĝo. Lecionoj okazadas, en sidejo de nia klubo, lunde kaj vendrede. Kurson gvidas **Danuta Ŵelińska** kaj **Stanisław Mandrak**.





Postpaska renkontiĝo en nia klubo



Merkrede la 7-an de aprilo 2010 ni renkontiĝis en festa paska etoso. Niaj klubaninoj kunportis por la kunveno diversajn tradiciajn paskajn manĝaĵojn. Ili ornamis tablon kun la pladoj. Viroj veninte al la klubejo estis surprizitaj pro tio. La kunvenon komencis tradicia interdividado per pecoj de ovo. Ovo simbolas la naskiĝantan novan vivon kaj samtempe printempon. Poste ni manĝis komune kaj interparolis. La kunveno daŭris ĝis fino en la agrabla etoso. Sur la fotoj Vi povas vidi la renkontiĝon.



Tragedio en Smoleńsko



Sabate matene la 10-a de aprilo okazis aviadila akcidento. Pola registara aviadilo TU-154 transportanta polojn al Smolensko (Rusio) surteriĝante kraŝis. Pollando nun vere suferas ĉar en la aviadilo estis personoj el diversaj partioj. Multaj eminentaj poloj kun pola prezidento Lech Kaczyński dum kelkaj sekundoj mortis. Ili ĉiuj flugis al Smolensko por omaĝi viktimojn de la II-a mondmilito.

Laŭ ordono de Stalin, en proksima de Smolensko loko, en Katyn oni mortigis polajn oficirojn. Vi sciu, ke la oficiroj etis kaptitaj kaj malliberigitaj post la eniro de soveta armeo sur pola teritorio la 17-an de septembro 1939. Ĝis nun, ne ĉio estas klara pri la murdo. Iom alia estas vidpunkto de poloj kaj iom alia vidpunkto de rusoj.

Sed dum lastaj tagoj poloj kaj rusoj estis survoje por plene klarigi la eventojn. Do, pro tio la aviadila tragedio en Smolensko estas kelkfoje pli dolora. Al retadresoj de niaj klubanoj nun venas kondolencoj. Ni dankas al ĉiuj sendintoj.

Jen la kondolecoj el diversaj landoj

Karaj geamikoj,
bonvolu akcepti niajn sincerajn kondolencojn okaze de la hieraŭa terura tragedio de pola nacio. Nome de ostrava E-klubo Jaroslavo, Ĉeĥio

Karaj samideanoj,
estis ŝokita tuta mondo, ankaŭ mi pro granda aertragedio kun 132 polaj pasaĝiroj en Smolensko. Bv akcepti ankaŭ miajn elkorajn kondolencojn al ĉiuj vi pro tia perdo kian mi konsideras ankaŭ nian. Via Bardhyl Selimi, Tirana, Albanio

Kara Stanislavo, Karaj polaj geamikoj

Ĝus nin atingis korŝira sciigo pri la katastrofo de la aviadilo kun la oficiala vialanda delegacio, gvidita de la Prezidento de Pollando s-ro Lech Kaczyński, survojinta al Katyn por honori memoron de mortpafitaj polaj oficiroj. Ĉi tie en Uzbekistano ni dividas kun vi vian funebron kaj ni esprimas al vi kaj al la tuta popolo de Pollando niajn elkorajn kondolencojn okaze de tiu ĉi terura tragedio forpreninta vivojn de multaj viaj samlandanoj.

Pacon al hela memoro de la Prezidento Kaczyński kaj de ĉiuj pereintoj en tiu ĉi aviadila katastrofo.

Kunsente kaj funebre viaj, Anatoli + familio + E-samarkandanoj

Anatoli Ionesov Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro

P.O. Box 76, UZ - 140100 Samarkando, Respubliko Uzbekistano

Kara Aleksander

Akceptu miajn sincerajn kondolencojn pro la terura aerakcidento en kiu pereis multaj sampatrujanoj viaj, inter ili via landa Prezidento. Estas tre grava perdo, ke tiom multe da gravuloj forpasis momente. Mi esperas, ke la pola politiko iros antaŭen malgraŭ tiu katastrofo.

HORI Jasuo (s-ro) Estrarano de UEA (landa kaj regiona agadoj)
10-27 Simosinden Maebasi Gunma 371-0822 Japanio

Estimata kaj Kara Samideano!

Akceptu mian sinceran kondolencon okaze de aviadila akcidento, kaj pro la tragedia perejo de la Prezidento de la Pola Respubliko s-ro Lech Kaczyński, lia edzino kaj multaj elstaraj reprezentantoj de la pola publika vivo.
Kun malgaja koro kaj animo. László Vörös, Hungario

Saluton!

Bonvolu transdoni miajn kondolencojn al niaj komunaj amikoj esperantistaj en via lando pro la morto de respublikestro kaj aliaj gravuloj kiuj aviadile vojaĝis al Rusujo. Mi esperas ke la lando povos rapide reakiri normalecon post tiaj bedaŭrindaj perdoj.

Amike kaj kunsenteme Rafaelo Mateos, Hispanio

Karaj niaj polaj gesamideanoj

Nome de ukrainiaj esperantistoj kaj de mi persone mi esprimas profundan kondolencon pro la nekorektebla perdo, kiu trafis popolon de Pollando - perejo de dekoj da elstaraj agantoj de Pollando, inter kiuj estas ankaŭ la Prezidento de Pollando Lech Kaczyński kaj lia edzino. Ni sincere dividas doloron pro la grava perdo.

Mikaelo Lineckij, Prezidento de UkrEA, Ukrainio

Ni kun malĝojo informas...



En marto 2010 mortis
unu el niaj aktivulinoj

Halina Jurska-Berezowska

Dum II-a mondmilito ŝi estis forpelita kun familanoj al Siberio. Tie ŝi travivis parton de sia juna vivo. Post reveno al Pollando ŝi lernis longjare pri rusa lingvo en Silezia Politekniko. Preskaŭ ĝis vivofino ŝi aktive partoprenis niajn aranĝojn.

Ni adiaŭas sin. Ripozu en paco!



Kun malĝojo ni informas,
ke la 27-an de aprilo 2010 forpasis

Czesława Bandrowska

longjara membrino de nia klubo.

Czesława Bandrowska estis valora kaj longjara scienclaboristino en kemia branĉo. Ŝi ricevis titolon docentino en fame konata Instituto de Neorganika Kemio en Gliwice. Ŝi dum pli ol 25 jaroj gvidis esperantan kabaredon "Amuzo" kiu prezentis diversajn programojn kies multe ŝi mem verkis. Pro ŝia riĉa kultura laboro ŝi estis honorigita per destingo nomata "Merita Kulturaganto".

Ŝia forpaso estas por ni granda perdo.

10-a Printempa Renkonto de Esperantistoj en Pelplin



La 22-an kaj la 23-an de majo 2010 oni organizis en Pelplin tre interesan aranĝon. Inter partoprenantoj estis ankaŭ 2 esperantistoj el nia klubo Stanisław Mandrak kaj Aleksander Zdechlik. La aranĝo havis riĉan programon kiun ornamis prelego de Roman Dobrzyński pri Frideriko Chopin. La prelego estis ilustrita per filmo farita de la preleganto. Tre interesa estis ankaŭ teatraĵo pri "Doktoro Esperanto" kiun prezentis pole Helena Biskup. Ĝi estis bona informilo pri internacia lingvo

kaj pri ĝia aŭtoro. Kiel ĉiam sian programon havis infanoj de Pelplin. Prezentiĝis folkloro ensemblo „Modraki” kaj infanoj de speciala lernejo.

Bedaŭrinde, ĉeforganizantino de la pelplina aranĝo Jadwiga Wasiuk anoncis ke la 10-a aranĝo estis la lasta. Ni petas la organizantinon por ŝanĝi la decidon ĉar manko de la aranĝo en nia e-kalendaro estos rimarkebla.





Seminario en Rytro

Ekde la 22-a ĝis la 29-a de majo 2010 en Rytro apud Nowy Sącz okazis la dua seminario de programo GRUNDTVIG "Lernado dum la tuta vivo" (subtenata de Eŭropa Unio). En la projekto partoprenis ankaŭ anoj de glivice'a klubo. Tutsemjnan intensan programon gvidis Katalin Kováts redaktoro de edukado.net. En la projekto partoprenis entute 28 poloj kaj slovakoj. Celo de la projekto estis preparigi la kursanojn al la KER-egzamena sesio kiu okazos dum SES en Slovakio. La kursmaterialo inkluzivis ankaŭ metodikajn partojn. Stano Marček prezentis sian lernolibron "Esperanto per la rekta metodo". Krome tutaga intensa lernado kursanoj havas ankaŭ tempon por promeni en vilaĝo, babili, komune kanti kaj rigardi esperantajn filmojn. Merkrede okazis la duontaga ekskurso en ĉirkaŭaĵo, oni vizitis interalie la muzeon de primitiva pentristo Nikiforo en la kuraĉloko Krynica kaj abelejon en Kamienna. Dum la tutsemajna restado en Rytro regis tre agrabla, amika etoso.





Inundo en Sonĉa Tero



Kvar tagoj post la fino de la seminario en Rytro la rivero Poprad elfluis el siaj bordoj kaj eniris en la pensiono en kiu loĝis partoprenantoj de la seminario. La teraso sur kiu ili lernis kaj amuziĝis estas kovrita per akvo. En manĝejo kaj Salono flosas mebloj. Lokoj kiuj estis la celo dum la ekskurso nun estas sub akvo. En la regiono ne funkcias trajnoj kaj busoj. Multe da pontoj estas detruitaj kaj multaj domoj estas sub akvo. Nur preĝo kaj espero restos al niaj geamikoj el

Sonĉa Tero. glivice'aj esperantistoj sincere kompatas ilin esperante, ke malbona sorto baldaŭ forlasos ilin.

Kunveno sur la pinto Ĉantorio



La 20-an de junio 2010 sur la pinto Ĉantorio okazis ĉiujara renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj. En la kunveno partoprenis ĉirkaŭ 20 esperantistoj. Inter ili estis anakŭ kvar anoj el nia klubo. Sur la fenestroj de la kabano ni pendigis kvar raklamafiŝojn pri nia aranĝo. La afiŝoj estis skribita en kvar lingovoj: ĉeĥe, pole, slovake kaj esperante.

Ni ĉiuj sidis ĉe la komuna, granda tablo en la kabano. Unue la reprezentantoj de ĉiu lando diris salutvortojn. Nome de ĉeĥoj parolis Jaroslav Sochanek, de poloj Aleksander

Zdechlik kaj nome de slovakoj Jan Weis. Poste ĉiuj longe babilis manĝante kaj trinkante bieron aŭ alian trinkaĵon. Ni ankaŭ komune kantis la esperantajn kantojn. Bedaŭrinde estis tre malbona vetero, dum la tuta tago pluvis, tiel ni ne povis pasigi la tempon ekstere. Pro la densa nebulo ne eblis admiri la belan montaran poejaĝon. Sed malgraŭ la veteraj malfacilaĵoj, la kunveno estis agrabla kaj gaja. Ni esperas, ke venontjare ni denove renkontiĝos sur la Ĉantorio.



Ĉebalta Printempo en Mielno

Ĉiujare en Mielno okazas tradicia esperantista aranĝo. Ĉijare tiu renkontiĝo daŭris de **la 15-a ĝis 23-a de junio**. Dum la inaŭguro estis interalie honora gasto, la vokto de la uberto Mielno. Mi ankaŭ partoprenis tiun renkontiĝon, kaj mi estis tie kun mia nepino Anna. Anna estis kontenta, ke ŝi havis okazon interparoli per angla lingvo, sed ŝi ankaŭ tre ekinteresiĝis pri esperanto, pro kio mi tre ĝojas. Dum la renkontiĝo okazis du kursoj. La fundamentan kurson qvidis Stanislavo Mandrak, kaj la duan Romano Dobrzyński. Por nia aranĝo venis ankaŭ eksterlandaj gastoj el Britio, Bjelorusujo, Hungario, Usono, kaj multaj poloj. Krom la kursoj estis interesa programo. Filmoj, prelegoj, kantado, ankaŭ estis interesaj ekskursoj kaj ofte dancado. La amantoj de freŝa aero povis promeni en la arbaro aŭ ĉe la maro. En la lasta tago oni organizis vesperan fajron dum kiu ĉiuj amuzĝis ĝis malfrua nokto. En venonta tago kun granda bedaŭro ĉiuj forveturis hejmen.

raportis Emilia Pieczara



Seminario en Piestany

Ekde la 2-a ĝis la 10-a de julio 2010 en Piestany en Slovakio okazis la tria seminario de programo GRUNDTVIG "Lernado dum la tuta vivo" (subtenata de Eŭropa Unio). La ĉeforganizanto de la programo estas la prezidantino de PEA Halina Komar. La seminario okazis dum Somera Esperanto-Studado (SES-2010). Partoprenantoj de GRUNDTVIG - projekto partoprenis en la programo de SES: antaŭtagmeze - lernado de Esperanto je la diversaj niveloj, posttagmeze - prelegoj, ekskursoj, sportoj ktp., vespere - diversaj distraj programoj. Okazis ankaŭ du busaj ekskursoj al Bratislava kaj al Trenčin. La 5-6-an de julio dum SES okazis la 12-a sesio de la novaj KER-ekzamenoj. Ĉiuj partoprenantoj (21 personoj) de la projekto GRUNDTVIG trapasis la KER-ekzamenojn je la nivelo B1, B2 aŭ C1.



Kunveno en Szczawno-Zdrój

Ekde la 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2010 en kuracloko Szczawno-Zdrój, apud Wałbrzych, okazis esperanta somera feriado. En la aranĝo partoprenis pli ol 30 esperantistoj. Estis tie ankaŭ anoj de nia klubo. Programo de kunveno estis riĉa kaj interesa. Ĉiun tagon ni komenciĝis per gimnastiko kun muziko. Post matenmanĝo okazis kursoj de Esperanto je la niveloj: por komencantoj, por progresantoj kaj por infanoj. Postagmeze estis organizitaj diversaj ekskursoj. Ni vizitis interalie: Szczawno-Zdrój kun ĝiaj kuracejoj, Wałbrzych, palmejon, karbominejon, kastelon en Książ. Ni ankaŭ promenis tra la

montaro. Vespere Roman Dobrzyński prezentis siajn filmojn. Ofte okazis komuna kantado kaj dancado. Kelkfoje ni partoprenis la koncertojn en bela teatrejo. En lasta tago ni kune vizitis la memortabulon al Zamenhof, kiu troviĝas en parko, ĉar nia majstro estis en kuracejo en Szczawno-Zdrój.

La aranĝo estis tre bone organizita sub gvidado de Teresa Pomorska. Dum tuta semajno regis vere agrabla, familia etoso. Ni glivice'aj partoprenantoj tre dankas al la organizantoj.



ARKONES

Ekde la 24-a ĝis la 26-a de septembro 2010 en Poznań okazis ARKONES (ARTaj KONfrontoj en ESperanto). Mia fratino kaj mi partoprenis la unuan fojon en ĉi tiu aranĝo. Ni ankaŭ estis neniam antaŭe en Poznań. Ni alvenis al Poznań jam jaŭde, tial ni havis tempon por viziti la urbon, precipe ke estis tre favora vetero. Poznań estas bela urbo, precipe plaĉis al ni ĝia urboplaco kun belega urbodomo. Je la 12-a horo ni havis okazon admiri famajn kapretojn, kiujn mi konis de legendo. Ni loĝis en studenta domo, kiu troviĝis proksime al stacidomo kaj ankaŭ proksime al nia arkonesejo - fervojista kulturdomo.

ARKONES komenciĝis vendrede vespere. La programo estis riĉa kaj interesa, okazis multe da prelegoj kaj artaj programoj. Prelegis konataj kaj spertaj esperantistoj. Oni povis partopreni en danckurso kaj en Esperanta-kvizo. Dum la mielvespero estis enmanigitaj diplomoj pro la venko en Tutpollanda

Interreta Plebiscito.

La diplomojn ankaŭ ricevis tiuj, kiuj trapasis ĉijare KER-ekzamenojn. Premiojn ricevis venkintoj en la esperanto-kvizo dum ARKONES.

En la aranĝo partoprenis preskaŭ ducent esperantistoj. En la proksima parko estis farita komuna foto.

Ni tre dankas al organizantoj pro interesa ARKONES 2010.

raportis Krystyna Grochocka





Ni memoru pri niaj mortintoj

Sabate la 30-an de oktobro 2010 niaj kolegoj okaze de proksimiĝanta festo je Ĉiuj Sanktuloj (la 1-an de novembro) vizitis tombejon kie dormas eterne esperantistoj de nia klubo: Eugeniusz Matkowski (esperanta poeto), Tadeusz Faliński (eksa prezidanto de nia klubo) kaj ĉijare mortintaj Czesława Bandrowska (kreintino de kabaredo "AMUZO") kaj Irena Miodyńska (longjara kasistino de nia klubo). La kolegoj Stanisław Mandrak kaj Aleksander Zdechlik ekbruligis sanktajn fajrojn sur la tomboj.



GRUPE 2010



Kiel en pasintaj jaroj, novembre en Gliwice ni organizis aranĝon **GRUPE**. Ĝi estis jam la 14-a aranĝo GRUPE-14. Nia aranĝo daŭris ekde la 11-a ĝis la 14-a de novembro 2010 en la sama loko kiel dum pasintaj jaroj. En la kunveno partoprenis esperantistoj el tuta Pollando kaj ankaŭ eksterlandanoj el Ukrainio, Ĉeĥio kaj Germanio. Dum la solena malfermo, kiel kutime, prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak kore salutis la patoprenantojn kaj reprezentantino de la urba

estraro Vicurbestrino Renata Caban deziris al ĉiuj fruktodonan kunvenon kaj agrablan restadon en Gliwice.



La 151-a datreveno de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof



La 15-an de decembro 2010 ni renkontiĝis por omaĝi la 151-an datrevenon de naskiĝo de Ludoviko Zamenhof. La kunveon komencis prezidanto de nia klubo Stanisław Mandrak. Li salutis ĉiujn partoprenatojn kaj diris kelkajn vorotjn pri nia majstro kaj lia devo. Poste nia koleginino Danuta Źelińska rakontis pri malmulte konataj interesaĵoj el la vivo de Zamenhof. Sekve ni rigardis kelkajn filmojn pri la kreinto de internacia lingvo. Fine ni trinkis kafon kaj manĝis kukojn babilante pri nia nomfestato. Dum la renkontiĝo regis agrabla kaj gaja etoso.

